# FORSTISTA INFORMILO

de INTERNACIA FORSTISTA RONDO ESPERANTLINGVA

Nr. 11, 1985-11-15
Augsburg dum 70a UK de UEA

Okaze de 70a UK de Universala Esperanto- Asocio kvin anoj de la forstista laborgrupo (Prof. Dr. H. D. Quednau, J. A. Pachter, Z. Glajcar, K. Pacholczyk kaj A. Barasievich) intensive konsilis la pluajn paŝojn en nia komuna tasko. Entute la anoj tri foje renkontiĝis dum la kongreso. Jen la raportoj de tiuj tri renkontiĝoj:

- Raporto pri renkontiĝo la 5- an de aúgusto en salono “Sinoda” en la kongresejo: S-ro Pachter gvidis la renkontiĝon, kiun krom anoj de la forstista laborgrupo ĉeestis kelkaj interesitaj gastoj. La anoj donis al si mem la provizoran nomon “Internacia Forstista Laborgrupo Esperantlingva- IFLE”, ĉar la neoficiala nomo “forstista laborgrupo” estas iom malmulte preciza. Ciuj opiniis, ke estus grave oficialigi nian grupon. Pri la formo oni devus
- baldaŭ decidi. Oni opiniis, ke estus plej bone stariĝi “Faka Asocio” ĉe UEA. La spertoj montris, ke estas grave pli ofte renkontiĝi por pli efike agadi en preparo de forstista fakvortaro kaj terminologio. Longan tempon oni pridiskutis la kontribuon por la renkontiĝo far de Stefan Massero el Sofio. Lia verko “Kelkaj ideoj pri l´internacia kontaktado kaj scienc- praktika kunlaborado de l´esperantoj- forstistoj” estas ĝenerale tre interesa kaj pripensebla. Tamen liaj ideoj estas jam parte realigataj parte nerealigeblaj nuntempe. Oni proponis publikigi la ideojn en tiu FI, por ke aliaj anoj eksciu pri ĝi kaj mem opiniu. La anoj decidis denove renkontiĝi vespere por prepari raporton pri la renkontiĝo por la kongresa kuriero “La strobili”. Tiu raporto estis publikigita en n-ro 5 la 8- an de aúgusto 1985, p. 4.

  La 8an de aúgusto 1985 la forstista laborgrupo daúrigis la diskutojn pri problemoj ligitaj kun plua kunlaboro por plurlingva forstista fakvortaro kaj forstista faka E-terminaro. Jen la rezultoj de tiu ĉi diskutado:

  1. Oni devas nepre daŭrigi la eldonadon de FI kiel forstistan bultenon kiu estigus iasence forumo por forstistoj. Estus dezirinde, ke ĉi tiu bulteno aperadu en Eberswalde (kiel ĝis nun) aŭ en alia socialisma lando.
  2. Oni konstatas, ke gravan rolon en nia laboro ludas internaciaj kunvenoj de ĉiuj kunlaborantaj anoj. Tiuj renkontiĝoj okazu ĉiujare, jen en socialisma jen en okcidenteúropa landoj.
  3. En Leipzig, printempe 1986 oni proponas organizi laboran renkonton por forstista laborgrupo, okaze de IFER´86.
  4. En somero, en Zilina 1986 oni proponas oficialan renkontiĝon kadre de SAEST´86.
  5. En 1987, dum Jubilea Kongreso en Varsovio okazos ankaŭ ĝenerala kunveno de forstistoj. Membroj de la forstista laborgrupo devas do streĉi ĉiujn fortojn por plenumi la unuan etapon de sia laboro, tio estas eldoni la unuan parton de la forstfaka vortaro ampleksantan 1000 terminojn. Estus dezirinde eldoni ĝin en iu socialisma lando (ekz. ĉe SEC en Budapesto).
  6. S- ro J. A. Pachter partoprenos kiel membro de IFLE = Internacia Forstista Laborgrupo Esperantlingva jenajn renkontiĝojn:
     a) Simpozio internacia pri arbarmortiĝo en Davos/ Svislando fine de aúgusto 1985.
     b) CIPRA- laborkonferenco en Bad Schliersee/ FRG (CIPRA = Commission Internationale pour la Protection des Régions Alpines)
     c) Kunvenon de IUFRO en Jugoslavio en 1986.

Dum tiuj renkontiĝoj s- ro Pachter observos la problemojn de faka forsta tradukado por ricevi spertojn al la laboro de la IFLE.

7. La anoj de IFLE kunlaboru kun komisiono por 70a UK- rezolucio, por ke en ĝi estu informo pri endanĝerigo de naturaj vivkondiĉoj (arbarmortiĝoj) kaj apelo kontraŭ malpurrigado de la aero internaciskale uzante Esperanton.
   Rimarko: IFLE proponis kune Asocio de Verduloj la rezolucian tekson pri ekologio. Ĝi estis de la komisiono iom ŝanĝite akceptita kaj publikigita fine de la kongreso.

Raporto pri la tria renkontiĝo:
La 9- an de aúgusto 1985 anoj de ĉe la kongresejo. Jen la rezultoj:

8. Estas dezirinde stariĝi ĉe LKK por 72a UK en Varsovio forstistan sekcion, kiu okupiĝus organizi aranĝojn por forstistaj partoprenantoj la 72-an UK en Pollando.
9. En ĉiu lando, kie estas 3 kaj pli multe da esperantistoj- forstistoj, oni starigu forstistan sekcion. Ĝi estu “kerno” varbanta pluajn kunlaborantojn.
10. Forstistoj- esperantistoj klopodu organizi Esperanto-kursojn por forstistoj en siaj landoj, kaj tie kie tio estas ebla, organizi instruadon de Esperanto en forstlernejoj, institutoj kaj oficejoj.
11. Tuj post sia ekstaro la forstista sekcio kontaktiĝu kun aliaj eksterlandaj forstistaj sekcioj. La Formoj de kontaktoj povas esti diversaj. FI povas esti parte helpo en tiu kontaktado.
12. En la plej proksima numero de “FI” oni informu pri la libro pri grekaj kaj latinaj radikoj uzataj en biologiaj sciencoj(Wortelemente lateinisch-griechischer Fachausdrücke in denbiologischen Wissenschaften, Cl. F. Werner, edit. VEB Max Niemeyer, Halle 1968)
13. Por ĉiuj informoj oni faru malgrandajn resumojn en naciaj lingvoj (t. e. lasi lokon por nacilingva resumo) kaj dediĉu por tio specialan numeron de FI. Ĝi estus iasence “informilo-varbilo” helpanta kapti novajn homojn por nia laboro.
14. Dum UK en Varsovio oni devus pritrakti (pridiskuti) forstistajn laborojn kaj proponojn kaj programojn por plua laboro.
15. Partoprenantoj diskutis pri jenaj fakterminoj:
    - pedologio
    - grundoscienco
    - terscienco.

    Oni konstatis, ke la plej “larĝa” nocio estas terscienco. Pedologio okupiĝas nur pri mallarĝa, ĝis dekkelkcentimetra surfaca tavolo de grundo. Por forstista uzo plej taúga estas “grundoscienco”, germane “Bodenkunde” aú pole “gleboznawstwo”. Ĉiu el tiuj terminoj troviĝu en forstista fakvortaro kiel memstara nocio.

J. –A. Pachter

KELKAJ IDEOJ PRI L´INTERNACIA KONTAKTADO KAJ SCIENC- PRAKTIKA KUNLABORADO DE L´ESPERANTISTOJ- FORSTISTOJ

Dum preskaŭ unujarcenta ekzistado de Esperanto-movado interalie aktivis en multaj landoj ankaŭ forstistaj kaj inĝenieroj. Ili partoprenis plej ofte kiel adeptoj de l´internacia lingvo kaj nur escepte montriĝis esperantlingve kiel forstistaj specialistoj, mastrumantoj de forstoj aŭ forstaj sciencistoj kaj publicistoj.
La nuntempa epoko de scienc-teknika progreso kaj intensaj internaciaj rilatoj kaj ankaŭ de reciprokaj sciencaj kaj ekonomiaj interŝanĝoj instigis iujn izolajn esperantistojn-forstistojn serĉi profesian interkonatiĝon trans landlimoj kaj kontaktojn kun samprofesilistoj per Esperanto.

Efektiviĝis ne unuj pli- malpli daŭraj kontaktoj, sed ili estis hazardaj kaj plej ofte individuaj. Kaj antaŭ du- tri jaroj en Eberswalde (GDR) ariĝis rondeto da esperantistoj-forstistoj, kiuj komencis kontakti kun alilandaj samprofesiuloj esperntistaj kaj iniciatis kompiladon de esperantlingva kompleksa fakvortaro (A - Z) pri forstsciencaj kaj – mastrumadas terminoj.
Baldaŭ tamen evidentiĝis, ke por internacia kontaktado kaj kunlaborado de la forstistoj per Esperanto estas bezonata kaj necesa daŭra internacia centro (centra oficejo, faka organizaĵo) de la esperantistoj-forstistoj, kiu devus organizi, unuecigi kaj gvidi la internacian aktivadon de la esperantistaj kolegoj.
Do la ĉefa tasko de ĉi-jara renkontiĝo de la forstistoj-esperantistoj dum la Universala Kongreso de Esperanto en Augsburgo (FRG) devas laŭ mi esti la establo kaj la ekfunkciigo de `Internacia centro de la esperantistoj- forstistoj´aŭ io simila. Mi supozas, ke la esperantistoj-forstistoj en FR Germanio posedas por tio la bezonatajn intelektajn premisojn kaj certe havos ankaŭ la necesajn monrimedojn.
La unua praktika tasko de la novfondita Centro devus esti elserĉi, altiri kaj organizi la plejparton de la esperantistaj forstistoj el ĉiuj landoj de la mondo. Tion oni povus realigi efekte per eldonado de modesta kserografie presata periodaĵo ekz. `Internacia Esperanto- Bulteno pri FORSTOJ kaj LIGNO`. Iom post iom la Bulteno ligos la E- forstistojn kaj informados ilin pri plej gravaj eventoj kaj atingaĵoj de la forstscienco, - ekonomio ktp. en la landoj de la mondo.
La E-forstistoj devus utiligi la paĝojn de la Bulteno por diskuti kaj klarigi la bazajn problemojn de la interlingvistikaj, leksikologiaj kaj leksikografiaj demandoj ĉirkaŭ la kreado / komplilado de la forst-sciencaj kaj ekkonomiaj terminoj en Esperanto. Pli poste kaj rezulte de tiu diskutado ellaboriĝos la fundamentaj principoj, laŭ kiuj devas esti kunmetata la dezirata E- fakvortaro.
Ĉio-ĉi tamen ne estas tiel simple kaj facile realigebla, kiel tio povus ŝajni. Estas ja bezonataj lingva sperto kaj bona kaj preciza konado de la vortsignifoj kaj terminaj ampleksoj en naciaj lingvoj kaj ankaŭ la internacia terminologia praktiko (v. E. Wüster!). Ofte unu kaj sama faknocio estas esprimata per diferencaj terminoj ekz. germanlingve: Holzernte- Rohholzbereitstellung. Kaj antaŭ ĉio: kiu devus esti la E-termino/ fakvorto pri bazobjekto de nia profesio: arbaro – forsto - silvo? Ĉu ni devis alpreni nur sciencajn fakvortojn (pedologio) aŭ nur komunlingvajn (grundscienco / scienco pri grundo) aŭ ni devus havi ambaŭ? Ktp., ktp. Ĉio- ĉi devus esti diskutata, klarigata kaj decidata kaj rekomendata por praktika uzado nome sur la paĝoj de nia faka E-Bulteno. Kaj ne nur pure teorie, sed tute praktike kaj pragmatisme per verkado kaj publicado de koncizaj /resumaj artikoletoj (tre riĉaj je faknocioj /terminoj) pri apartaj temoj el unuopaj forstaj sciencobranĉoj. Ĉar la vortoj kaj ankaŭ la fakvortoj akiras ja sian veran kaj precizan signifon nur en la kunteksto de la frazoj.

+

Mi traktis tre koncize kelkajn tute komencajn problemojn de nia estonta agado. Per tio mi dezirus instigi la kolegojn al pli rapida kaj pli efika diskutado kaj fine al krea decidado. Mi konscias, ke nia laboro staras antaŭ ni kaj la pli junaj inter ni devas eklabori sindone kaj obstine.

+

Resume kaj konklude: la esperantistoj-forstistoj meritas ekhavi sian internacian E-centron kaj ekposedi sian propran E-fakbultenon.

+

Fine mi salutas tre amike kaj kolege ĉiujn esperantistojn-forstistojn, kiuj partoprenos la forstistan fakkunvenon en Aŭgsburgo ´85 kaj deziras vere fruktodonan kaj sukcesplenan laboron.

Stefan Masserow
dipl.- forstinĝ. , pensiulo, Sofia(Bulgario)